



la informilo

informbulteno pri esperanto

bulletin bilingue d'information sur l'espéranto

eldonisto:

ESPERANTO - FEDERACIO DE ORIENTA FRANCIO

*Fédération Culturelle de l'Est pour l'Espéranto
Maison des Jeunes et de la Culture*

27, rue de la République, 54000 NANCY F


PCK - CCP: 1997-72 (N) NANCY

nouvelle série

trimestriel

2^{ème} trim. 1980

N° 30



abonnement


un an: 13F

UNU JARO : 13F

(8 INTERN. KUPON.)

ANTO....FLASH★ESPERANTO....FLASH★ESPERANTO

LES CONGRESSISTES DE METZ REÇUS A L'HÔTEL DE VILLE (photo De Zilah) ★




Organisé dans une cité où l'espéranto connaît un regain d'activité grâce au dévouement d'une équipe diversifiée, le 39ème CONGRES FEDERAL D'ESPERANTO de la région Est s'est révélé l'un des plus fructueux de ces dernières années. Accueillis à l'Hôtel-de-Ville par le Maire-Adjoint Madame JUDLIN, les participants eurent la satisfaction de voir le député J. LAURAIN apporter son soutien sans réserve à leur action.

Ce dernier a d'ailleurs l'intention de créer un inter-groupe parlementaire pour faire aboutir la proposition de loi déposée par le Parti Socialiste, proposition dont nos lecteurs peuvent prendre connaissance dans ce numéro.

Parmi les nombreuses décisions prises au cours de ce Congrès, notons la nomination d'un nouveau Président, P. DENIS, Directeur-Adjoint de Collège à BAR-le-DUC, remplaçant J.P. COLNOT, désireux de se consacrer -entre autres tâches multiples!- à la gestion du cours d'espéranto par correspondance le plus suivi de France.

Le baryton bulgare Veselin DAMJANOV, accompagné du pianiste MERCIER a par ailleurs donné un récital fort apprécié à la salle de concert Braun.



STAGES ACCELERES D'ESPERANTO ★

Cette initiative de la Fédération de l'Est -le 10ème stage vient de se dérouler à SOULTZBACH les 14 et 15 juin- rencontre toujours un réel succès. Près de 60 participants dont 17 commençants, répartis en 4 degrés, se sont perfectionnés dans la langue internationale.

Le prochain stage qui se déroulera à NANCY (à la M.J.C. Philippe DESFORGES, rue de la République) les 15 et 16 novembre prochains, innovera en la matière. Un cours de 5ème degré accueillera en effet les fervents de la littérature mondiale espérantiste.



SEMAINE INTERNATIONALE DE PRINTEMPS A LA MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE DE GRESILLON

Cette semaine a regroupé, du 6 au 13 avril, 70 personnes dont près de 50 enfants accompagnés par leurs instituteurs ou leurs parents. Les jeunes participants venus de 5 pays, Australie, Danemark, Belgique, Pays-Bas et France, ont été répartis en 4 classes pour suivre les cours d'espéranto qui avaient lieu le matin. Les après-midi ont été consacrés à des promenades, à la grande foire pascale de Baugé, à une excursion à Saumur, etc. Chaque soir tout le monde se retrouvait pour la veillée consacrée au chant, à la musique, à la projection de diapositives. La semaine a vraiment eu un caractère international et l'espéranto a pleinement rempli son rôle de langage second.

LES DEPUTES ET L'ESPERANTO



Grâce aux efforts de l'UNION ESPERANTISTE FRANCAISE, de plusieurs militants locaux, grâce également à l'engagement sans réserve de plusieurs députés dont Jean LAURAIN député socialiste de MOSELLE, un nouveau projet de loi sur l'enseignement officiel de l'Espéranto vient d'être déposé à l'Assemblée Nationale.

Notre Fédération de l'Est envisage à ce sujet à la rentrée scolaire, l'organisation d'une campagne de pétitions en faveur du projet, campagne dont les modalités seront définies dans le n° 31 de LA INFORMILO.

N° 1550

PROPOSITION DE LOI

ASSEMBLÉE NATIONALE

CONSTITUTION DU 4 OCTOBRE 1958

SIXIÈME LÉGISLATURE

PREMIÈRE SESSION ORDINAIRE DE 1979-1980

Enregistré à la Présidence de l'Assemblée nationale le 19 décembre 1979.
Annexe au procès-verbal de la séance du 20 décembre 1979.

PROPOSITION DE LOI

tendant à inclure la langue internationale **Espéranto** dans l'enseignement secondaire et l'enseignement supérieur comme langue à option.

(Renvoyée à la commission des Affaires culturelles, familiales et sociales à défaut de constitution d'une commission spéciale dans les délais prévus par les articles 30 et 31 du Règlement.)

PRÉSENTÉE

PAR MM. JEAN LAURAIN, JEAN-MICHEL BOUCHERON, PHILIPPE MARCHAND, PHILIPPE MADRELLE, MAURICE POURCHON, MICHEL ROCARD, ALAIN VIVIEN

et les membres du groupe socialiste (1) et apparentés (2)

Députés.

(a) La distribution officielle du document faisant courir les délais de procédure aura lieu le premier jour de séance après le 11 janvier 1980.

(1) Ce groupe est composé de : MM. Andrieu (Haute-Garonne), Aumont, Auroux, Aultain, Mme Avice, MM. Gérard Bapt, Bayou, Béche, Itoland Beix, Daniel Benoist, Besson, Billardou, Billoux, Boucheron, Brugnon, Cambolive, Ceillard, Chandernagor, Chénard, Chevènement, Jean-Pierre Cot, Darinot, Darras, Defferre, Delehedde, Delelis, Denvers, Derosier, Henri Deschamps, Dubedout, Dupilet, Duroure, Emmanuelli, Evin, Fabius, Faugaret, Gilbert Faure, Fillioud, Florian, Forgues, Forni, Franceschi, Gaillard, Garrouste, Gau, Guidoni, Harschbroeck, Hautecœur, Henu, Houteer, Huguet, Huyghues des Etages, Mme Jacq, MM. Jagoret, Joxe, Labarrère, Laborde, Pierre Lagorce, Laurain, André Laurent, Laurissergues, Lavédrine, Lavielle, Le Drian, Lemoine, Le Pensec, Bernard Madrelle, Philippe Madrelle, Malvy, Manet, Marchand, Masquère, Mauroy, Mellick, Mermaz, Mexandoau, Claude Michel, Henri Michel, Mitterrand, Nolebart, Nucci, Pesce, Philibert, Pierret, Pignion, Pistre, Poperen, Pourchon, Prouvost, Quilès, Raymond, Alain Richard, Michel Rocard, Saint-Paul, Sainte-Marie, Santrot, Savary, Sénès, Taddei, Tondon, Vacant, Vidai, Alain Vivien, Claude Wilquin.

(2) MM. Abadie, Baylet, Alain Bonnet, Césaire, Crépeau, Defontaine, Paul Duraffour, Maurice Faure, Julien, François Massot.

Langues étrangères. — Enseignement secondaire - Enseignement supérieur - Espéranto.

Article premier.

L'étude de la langue internationale nommée « Espéranto » est admise comme matière à option dans les programmes de l'enseignement secondaire et de l'enseignement supérieur.

Art. 2.

Aux examens de l'enseignement secondaire et de l'enseignement supérieur, comportant une ou plusieurs épreuves de langues étrangères, la langue internationale « Espéranto » est ajoutée à la liste des langues étrangères sur lesquelles peuvent porter ces épreuves.

Art. 3.

L'enseignement optionnel de l'« Espéranto » se fera progressivement dans les établissements publics d'enseignement de l'Etat ; il aura lieu chaque fois qu'il sera demandé et qu'il existera un professeur compétent.

Art. 4.

Les épreuves d'examen seront introduites, dans les conditions fixées à l'article 2, chaque fois que le jury pourra s'adjoindre un examinateur compétent.

Art. 5.

Pour l'enseignement et pour les examens, les candidats bénéficieront de moyens et d'avantages semblables à ceux accordés aux élèves apprenant des langues étrangères.

Art. 6.

La formation des professeurs sera réalisée, sous la responsabilité des universités, par l'organisation de cours et de stages fonctionnant dans le cadre de l'enseignement supérieur qui délivrera les diplômes témoignant de la compétence des professeurs et examinateurs. La période transitoire sera aménagée par voie réglementaire.

Art. 7.

A titre transitoire, pendant la mise en place, le ministère de l'Education et le ministère des Universités pourront consulter l'organisation privée dénommée « Institut français d'Espéranto », qui, jusqu'à ce jour, délivrait les diplômes.

EXPOSÉ DES MOTIFS

MESDAMES, MESSIEURS,

Le progrès des techniques dans le domaine des transports et de la communication, pour ne citer, à titre d'exemple, que les nouvelles transmissions instantanées à travers le monde par l'intermédiaire des satellites d'intercommunication, montre, de toute évidence, que le rapprochement physique des peuples est un fait accompli.

L'évolution économique du monde tend à la formation de plus vastes unités politiques : telle est l'extension de la communauté européenne. Et pourtant, il subsiste encore un hiatus entre le développement scientifique de caractère universel et le cloisonnement linguistique et moral qui isole les peuples d'une façon plus stricte qu'une frontière.

Si, de nos jours, ce rapprochement physique, économique et politique des peuples s'impose, en effet, chaque jour davantage, il ne se heurte pas moins à la diversité des langues et met en relief le besoin sans cesse croissant d'une langue commune de communication.

Afin de remédier à cette situation, on a pu préconiser, pour des raisons de facilité et d'économie, d'étendre dans l'immédiat l'usage d'une seule langue principale de travail. Mais, le choix de cette langue, qui doit recueillir l'adhésion de tous les Etats et répondre au besoin essentiel d'une communication orale, directe et spontanée entre des hommes de toutes conditions sociales, soulève bien des difficultés.

La première solution qui vient à l'esprit serait de revivifier une langue morte comme le latin. Mais, cette hypothèse ne résiste guère à l'examen : une telle langue, déjà délaissée par l'Eglise, est inadaptée aux besoins de la vie moderne ; elle rebuterait tout le monde par ses difficultés grammaticales.

La deuxième solution orienterait le choix sur une langue nationale de grande expansion. Mais, ceci conduirait nécessairement à une discrimination d'autant plus redoutable que le pays dont la langue serait choisie étendrait inévitablement sa suprématie, tant culturelle qu'économique, sur les autres nations. Il ne serait pas raisonnable de croire que les peuples accepteraient de voir leur patrimoine culturel dangereusement menacé et peut-être un jour évincé.

La troisième serait celle d'un bilinguisme de langues nationales, tel le bilinguisme franco-anglais. Mais, en réalité, ce palliatif, suggéré par des circonstances exceptionnelles à la fin de la dernière guerre, suppose un trilinguisme : comment, en effet, un Allemand ayant appris l'anglais comprendrait-il un Italien utilisant le français ? Cette sorte de bilinguisme conduirait donc à une nouvelle discrimination qui entraînerait pour les autres peuples, donc pour la majorité des hommes, la nécessité d'apprendre deux langues étrangères. Et l'on ne voit pas pourquoi d'autres peuples ne chercheraient pas à imposer d'autres « bilinguismes » : russe et allemand, chinois et hindi par exemple ! En outre, une telle solution hybride resterait probablement précaire et certainement dangereuse pour l'avenir de ces deux langues, car il serait à craindre que l'une d'elles supplante l'autre (ce qui ramènerait les inconvénients de la deuxième solution) ou bien que mutuellement elles se contaminent peu à peu, se désintègrent et essaient en divers jargons tels que le « franglais ».

Aussi la meilleure solution est-elle l'usage d'une langue internationale qui le soit par nature et par destination, d'une langue d'un emploi facile pour tous les hommes et qui, de ce fait, serait immunisée contre les influences des langues nationales.

Cette solution donne tout son sens au seul vrai bilinguisme valable pour tous les hommes :

- langue nationale au sein de la communauté nationale ;
- langue internationale pour les relations internationales.

Il va de soi qu'un tel moyen de communication éviterait à tous les êtres humains, quels que soient leur rang social, leur niveau intellectuel, leur idéologie et leur origine, l'intolérable ridicule de ne pouvoir s'exprimer librement hors de leurs frontières linguistiques ; il serait le facteur d'un progrès incalculable sur le plan des échanges économiques, techniques, scientifiques, touristiques et pour l'enrichissement culturel des hommes.

Cette solution, grâce à laquelle aucun homme ne se trouverait en situation d'infériorité devant un étranger de quelque pays qu'il soit, aurait enfin l'avantage de mettre un terme à la discrimination linguistique et, par suite, à la compétition dangereuse et coûteuse qui en découle.

La conférence générale de l'U.N.E.S.C.O. a reconnu que les résultats obtenus au moyen de l'Espéranto dans les échanges intellectuels internationaux et pour le rapprochement des peuples correspondent aux buts idéaux de l'U.N.E.S.C.O. : c'est dire combien ils contribuent à la coopération internationale dans les domaines de l'éducation, de la science et de la culture.

L'Espéranto se présente, de nos jours, après quatre-vingts ans de formation, d'expériences et de traditions, en dépit de deux guerres mondiales, comme la seule langue vivante, fondamentalement internationale, qui soit facile et accessible à tous, logique et claire, parfaitement disponible pour l'expression de valeurs culturelles d'ordre international.

Son introduction dans l'enseignement public a fait l'objet de nombreux vœux exprimés par des membres de l'Institut de France, des savants et des linguistes, des hommes politiques et des enseignants de presque tous les pays du monde.

L'organisation progressive de son enseignement ne dépend plus présentement que d'une décision politique : il vous appartient, Mesdames et Messieurs, de prendre cette décision qui assure à la fois la sauvegarde et le rayonnement des différents patrimoines culturels de l'humanité dans une compréhension et coopération générales de tous les peuples.

N'est-ce pas à la France, dont le rôle humanitaire ne peut être contesté, de donner l'exemple en propageant l'étude d'une langue auxiliaire neutre, tant recherchée depuis des siècles, pour rendre faciles et meilleurs les rapports, à travers le monde, entre les hommes de toutes origines ?

L'admission de la langue internationale Espéranto comme langue à option dans les programmes de l'enseignement secondaire et de l'enseignement supérieur est l'objet de la présente proposition de loi que nous vous demandons de bien vouloir adopter.



L'ESPERANTO SUR LE CHANTIER INTERNATIONAL DES "MOULINS DES APPRENTIS" DE LA CREUSE

Sensibilisés au difficile problème de la communication, les responsables de l'Association ont décidé d'accorder une place de choix à l'espéranto dans les futurs chantiers de rénovation qui s'ouvriront l'été prochain. C'est ainsi qu'en début juillet le moulin de Malval est mis à la disposition des espérantistes pour rénovation. Nous reviendrons sur cette expérience qui peut s'avérer d'un intérêt capital pour tous les chantiers internationaux confrontés aux mêmes difficultés.

Pour tous renseignements, deux adresses :

J.E.F.E.O. 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 PARIS

D.S. CLOPEAU, 6 rue Corot, 22000 SAINT-BRIEUC.

LE MARECHAL TITO ET L'ESPERANTO



Comme feu le Président de la République Autrichienne F. JONAS, le maréchal Tito ne s'est pas contenté d'apporter son soutien sans réserve à l'espéranto... C'est en prison qu'il apprit lui-même la langue internationale. En 1953 et 1973 il patrona les Congrès Universels de Zagreb et de Belgrade et définit ainsi son point de vue sur le problème: " Il appartient à une opinion publique bien informée d'imposer la reconnaissance officielle de l'espéranto et son utilisation à grande échelle. Les grandes nations voudraient assurer la suprématie de leurs langues mais l'espéranto dans sa capacité d'évoluer est bien la langue de l'avenir..."



UNE DELEGATION DE CHINOIS AU CONGRES DE STOCKHOLM EN AOUT PROCHAIN

Déjà présents au Congrès de Varna et de Lucerne les Chinois seront à nouveau auprès des espérantistes du monde entier dans la capitale suédoise. Cette délégation sera conduite par l'écrivain de réputation mondiale BAKIN. Une délégation de la Ligue Espérantiste Chinoise se rendra également au deuxième Congrès du Pacifique à Vancouver (Canada).

LA PRESSE ESPERANTISTE SE PORTE BIEN!



"HEROLDO DE ESPERANTO", le "grand format" des organes de presse en langue internationale vient de fêter ses 60 années d'existence; il paraît tous les quinze jours. "EL POPOLA ĈINIO", le mensuel édité en Chine Populaire diffuse un n° spécial à l'occasion du trentenaire de sa fondation. Quant à ESPERANTO, la revue mensuelle officielle de U.E.A. (Association Esperantiste Universelle), elle fêtera allègrement en juillet son... 75ème anniversaire! Le "petit dernier", MONATO, lancé en début d'année compte déjà des abonnés dans plus de 30 pays. C'est un véritable magazine international d'information. Sa caractéristique unique... tient au fait que ses reporters sont des lecteurs répartis sur toute la planète!



UN DOSSIER RADIOPHONIQUE SUR L'ESPERANTO

Une émission d'une durée d'une heure s'est déroulée le 6 mai dernier dans le cadre d'une série très populaire en Espagne, émission intitulée "Minuit". Le débat auquel participèrent de nombreux auditeurs était mené par des responsables de l'Education, de la Presse et du mouvement espérantiste espagnol.

EDITION D'UN COURS RADIODIFFUSE D'ESPERANTO EN GRANDE-BRETAGNE



Due à l'initiative de militants espérantophones très connus, le "groupe des cinq", cette méthode comprend dorénavant un cours de second degré présenté récemment par la BBC. Plusieurs stations de radio universitaires et locales ont déjà diffusé les premières cassettes... ainsi qu'aux USA, en Australie et en Italie.

NEPRE BONE NOTU!

VEUILLEZ BIEN NOTER SANS PLUS TARDER!

Nous publions régulièrement, dans la mesure de nos possibilités, un calendrier des rencontres internationales intéressant particulièrement entre autre notre région. Pour des raisons d'ordre technique, il ne nous est pas possible d'insérer plusieurs fois ou de rappeler les communiqués les mentionnant.

Il vous appartient de noter sur votre agenda celles qui sont susceptibles de vous intéresser ainsi que l'adresse des responsables qui vous fourniront tous renseignements complémentaires.

-
- 4-6 Julio Somerfesto en Egesbach/darmstadt
informas: Tini kaj Eki WOITE, An der Kirche 35 6115 MUNSTER (RFA)
- 6-11 Julio Meza kurso de Esperanto
informas: Kultura Centro Esperantista, Postiers 27, Poŝtĉeko 771
CH - 2301 LA CHAUX DE FONDS (Svislando)
- 13-18 Julio Kion kaj kiel instrui en dekvespera E°-kurso?
informas: sama adreso
- 17-20 Julio Internacia Junulara Renkontiĝo de Biciklantoj!.. en Hamburgo.
informas: Thomas Bormann, Scharstr. 26, D - 2050 HAMBURG 80
- 20-25 Julio Karavano de Hamburgo al.... Rauma (Finnlando) por la
36a Internacia Junulara Kongreso... ankaŭ parte biciklante!
informas: sama adreso
- 20-25 Julio Elementa Kurso de Esperanto
informas: K C E (vidu supre)
-
- 27 Julio/1 aŭgusto Intimiĝo kun Ĵuraso
informas: K C E ...
- 25 Julio/1 aŭgusto 36a Internacia Junulara Kongreso en RAUMA (Finnlando)
informas: Th. Bormann (vidu supre)
- 2-9 Aŭgusto UNIVERSALA ESPERANTO-KONGRESO en STOCKHOLMO
informas: LKK Un. Kongr. de E° - Box 4009 S 12204 STOCKHOLM
- 10-15 Aŭgusto Konotacia Valoro de la Lingvo en la Esperanto-Teatro
informas: K C E (vidu supre)
- 10-15 Aŭgusto Meza kurso de Esperanto
informas: K C E (vidu supre)
- 17-22 Aŭgusto "Sinjoro Tadeo" (de la aŭtoro Adam MICKIEWICZ)
informas: K C E (vidu supre)
-
- 7 septembro Fungomigrado!
informas: T. kaj E. Woite (vidu supre)
- 16-30 Septembro Internacia Labor-brigado apud Schlüchtern
(100 km nordoriente de Darmstadt)
informas: T. kaj E. Woite (vidu supre)
- 26-28 Septembro Kultursemajnfino en Junkerwald
prelegos D-r° CARLEVARO pri Volapdk centjara
informas: S E L Schulstr. 30 D 6601 SCHEIDT
- 3-5 Oktobro Semajnfina Seminario en "T A N E F" - Domo
E°-kurso (4 ŝtupoj)
informas: Manfred Führer, Am Stadtpfad 11, D 6236 ESCHBORN/TS.

ni bone kongresis !

Estis la 26a de aprilo kaj pluvis! Super la strato, kiu kondukas al MJC St-Marcel en METZ, malseke klopodis flirti verda banderolo anoncanta: ESPERANTO KONGRESO. Jes, estis tie. Povis esti nur tie, ĉar jam aŭdiĝis la reciprokaj salutoj de gajaj, babilmaj "verduloj". Jen la kutima etoso; jam oni forgesis la aĉan veteron. Ankaŭ ĉi-foje, kaj dank' al la bona organizado kaj diligente efika laboro de la METZ-a grupo, ĉio funkciis glate. Koran dankon al ili!

En la Metz-a urbodomo, la vicurbestrino, S-in^o JUDLIN, salutis la kongresanojn (inter ili gastoj el Germanio) kaj fakte miris pri tiu decidema aktivularo, kiu ne sin lasas malkuraĝigi de la malfavoraj mondaj eventoj. Diable! Ni estas ESPERANTISTOJ! Cetere: ĉu la parolado de politikisto -la deputito Jean LAURAIN- kiu promesas subteni nian aferon kaj anoncas la kreon de parlamenta intergrupo, studonta la eblecon de oficiala instruado de Esperanto (leĝpropono n^o 1550) ne estas kuraĝiga afero? Refoje: ni esperu kaj aktivu! Sinjoro COLNOT citis sufiĉe da konvinkaj ciferoj por persvadi eĉ la plej hezitemajn pri la neceseco de universala, neŭtrala helplingvo. Finfine post denova babilado kaj trinkado de la donacita ĉampanvino, ĉiuj ekveturis al la kasteleto "Ermitage St-Jean". Daŭre pluvis! Rapide ĉiuj enloĝiĝis kaj rapidis al la kongresejo.

Dum la nefederacianoj ĉeestis diskutrondon, gviditan de Sr^o DE ZILAH (temo de la diskutoj: artikoloj de la revuo MONATO, al kies redaktorado ankaŭ kunlaboras S-r^o De Zilah), la federacianoj aŭskultis la raporton de la delegitoj de 10 urboj, kie funkcias kursoj kaj: aŭ grupo: METZ NANCY, PONT-SAINT-VINCENT, TOUL, BAR-le-DUC, THIONVILLE, SELESTAT STRASBOURG, COLMAR, MULHOUSE. Ŝajnas, ke la plej videbla rezulto estis la granda nombro de gejunuloj, kiuj ĉeestis la kongreson.

Tiun unuan laborkunsidon sekvis vespermanĝo en la kastelo. Ĉi-tie necesas substreki la diligentan servadon fare de la gastigantoj helpitaj de kelkaj Metz-aj grupanoj. Sed jam buso atendis ĉe la enirejo por veturigi nin al la koncerto-ĉambro Braun en METZ, kie nin regalis per majstra kantado la bulgara opero-kantisto Veselin DAMJANOV, akompanata de la pianisto Marcel MERCIER. Ĉu necesas plue laŭdi la majstron? Per belega, nuancoplena voĉo li ĉarmis nin dum la tuta vespero. Plie li persvadis la neesperantistan ĉeestantaron, ke nia lingvo ankaŭ taŭgas por tiom altnivela kultura spektaklo.

Dimanĉe la plena kunsido komencis je la 9a. Gravaj diskutoj ekestis pri la respektiva rolo de UFE kaj de la Federacioj. Klare evidentiĝis, ke io pozitive ŝanĝiĝas en la laborplanoj kaj agadmanieroj de UFE kaj la federacianoj montris sin pretaj subteni tiun vekiĝon. Donaco de 1000 frankoj al la nacia asocio estis la unua tuja helpo. Pli precize ili difinis siajn celojn en 2 rezolucioj al UFE (vidu aparte) kiuj estis adoptitaj unuanime. Ili ankaŭ akceptis la proponon de S-r^o LIENHARDT pri la anstataŭigo de la vorto "Unuiĝo" en la titolo de UFE per la pli simpla kaj tute taŭga substantivo "Unio". Krome okazis la voĉdonoj por la elekto ĉe la komitato de UFE kaj de la Federacio.

La finon de la kunsido reĉeestis la deputito LAURAIN, kiu refoje anoncis sian subtenon kaj eĉ promesis lerni esperanton... tuj kiam li havos tempon. Tiucele donacis al li S-r^o COLNOT lernolibron.

Post la plena kunsido ĉeestis ankaŭ S-r^o Laurain la meson en esperanto celebritan de pastro DEGRELLE en la kapelo de la kastelo.

La surprizo de la tago okazis post la tagmanĝo. Dum grupo da samideanoj vizitis Metz, la nova komitato havis sian unuan kunsidon kaj elektis sian estraron. Kaj jen: Sinjoro COLNOT, nia aktivega, sindonema prezidanto volonte ekŝiĝis. Sed ĉiuj scias ke tion li nur faris por pli vigle agadi en NANCY (ĉefe por la perkoresponda kurso kaj la organizado de staĝoj). Ni dankegu al li pro la bonega laboro kaj ni deziru bonan ŝancon al Sinjoro DENIS, alia famkonata, aktivega samideano, kiu anstataŭas lin.

Karaj gesamideanoj, refoje ni venis, vidis kaj plupaŝetis al la venko. Esperanto vivu kaj prosperu! Kaj ni aktivu!

La Sekretario

Edmond LUDWIG

REZOLUCIOJ AL U. F. E.

La partoprenantoj de la 39a Kongreso de la ORIENTFRANCA ESPERANTO-FEDERACIO, kiu okazis en METZ la 26an kaj la 27an de aprilo 1980

1 - ... analizis la rezultojn atingitajn de la Federacio rilate la disvastigon de Esperanto.

Konstatis, ke multaj lernantoj, kiuj eklermis esperanton, poste restas en la movado dank' al la ekzisto de aranĝoj organizataj en ilia proksima regiono (staĝoj, libro-servo kun ebleco konsulti la libroron surloke, perkorespondaj kursoj, federacia bulteno "LA INFORMILO", en kiu ĉiu povas sin esprimi kaj kiu raportas pri la progresado de la movado en la proksima, ne tre vasta regiono).

Sekve substrekas la gravecon de la Federacio.

Deziras alvoki al la aktivularo de la Pariza Federacio, por ke ili klopodu ke la sidejo de UFE estu ne nur centra administrejo, sed ankaŭ fariĝu internacia renkontejo konstante vizitebla de ĉiulandaj esperantistoj kaj inda je urbo kiel Parizo.

Estas pretaj subteni individue kaj federacio-nivele la klopodojn por la atingo de nia komuna celo kaj studados la diversajn eblecojn por vigligi kaj efikigi tiun kunlaboradon.

Decidas -siaflanke- pro la proksimeco de aliaj landoj, plivigligi la kontaktojn kun la translima esperantistaro:

INTERNACIECO ĈIAM RESTU NIA CELO.

2 - ... pripensis la problemon de interŝanĝo de informoj inter UFE kaj la Kulturaj Centroj.

Petas, ke UFE sendu sufiĉe frue (eĉ komence de la someraj ferioj) kaj nur al la estraro de la Federacioj, demandaron, kiu prezentus nur vere utilajn demandojn por la statistika laboro de UFE.

Instigas la Prezidantojn de la KULTURAJ CENTROJ kaj la UNUOPAJN AKTIVULOJN daŭre raporti al la prezidanto aŭ al la sekretario de la Federacio. Instigoj al regula raportado aperos en ĉiu n° de la federacia bulteno.

3 - ... proponas anstataŭigi la vorton "UNUIĜO" en la titoló de UFE per la pli simpla kaj tute taŭga substantivo UNIO trovebla en la Plena Ilustrita Vortaro.

La du unuaj rezolucioj estis akceptitaj unanime.

Por la tria: por... 17 kontraŭ... 3 sindeteno... 5

JEN LA NOVA KOMITATO DE LA FEDERACIO:

Jean-Paul	COLNOT	(NANCY)	Edmond	LUDWIG	(STOSSWIHR)
Roger	DEGRELLE	(NANCY)	Marie-Thérèse	MAS-GIORGETTI	(NANCY)
Pol	DENIS	(BAR-le-DUC)	Marthe	NAU	(THONVILLE)
Brigitte	GIUMMELLY	(THONVILLE)	Françoise	ROUAULT	(COLMAR)
Gérard	GREINER	(TOUL)	Jean-Luc	VANOLA	(BAR-le-DUC)
André	GROSSMANN	(BALDERSHEIM)	Bernard	VIVIER	(JOEUF)
René	GUILLAUME	(PONT-St-VINCENT)	Madeleine	DE ZILAH	(METZ)
Claude	LONGUE-EPEE	(CONNANTRE)			

JEN LA NOVA ESTRARO:

Prezidanto:	Pol DENIS	5, Chemin de Blamecourt	55000	BAR-le-DUC
Vicprezidanto:	Jean-Paul COLNOT	15, rue Lavaux	54520	LAXOU
Unua Sekretario:	Edmond LUDWIG	46, rout de la Schlucht	STOSSWIHR	68140 MUNSTER
Dua Sekretario:	Françoise ROUAULT	36, rue du raisin	68000	COLMAR
Kasisto:	André GROSSMANN	5, rue des Pyrénées	68390	BALDERSHEIM
Libro-servo:	Roger DEGRELLE	11, Cours Léopold	54042	NANCY
Redaktoro de la INFORMILO:	Pol DENIS			

el la nuprezidanta angulo!...

Simpla komitatano alvenante en METZ... mi forlasis la urbon ĉapelumita per nova tue neatendita kaskedo. Mi ne intencas pretendi, ke oni atakis min per surprizo sed mi suspektas, ke mia baldaŭa stato de "emeritulo" ne estis nekonata de multaj kongresanoj. Bedaŭrinde mi konstatas, ke en diversaj ĉirkaŭaj medioj, kien mi pli malpli enŝovis mian manon por "helpi al pastoknedado"... oni tutsame okulumas al tiu "ŝanculo", kiu certe enuos pro neniofarado!...

Serioze dirite mi ne kapablos "prezidenti" tiel intensive kaj seninterrompe kiel faris nia komuna amiko Jean-Paul COLNOT. Dediĉi tiom da horoj pojare al esperanto kiom li elspezis estas fakte rikordo nesuperebla. Profesie li ja estas esperantisto, sed ĉar estas ankaŭ necese certagrade en la vivo boligi la supon... li hodie estas helpapotekisto...

Mi humile konfesas, ke koncerne min, esperanto kuŝas inter multifacetaj kromlaboroj, kiujn mi ne intencas forlasi dum mia oficiala "senlaboreco". Sekve mi antaŭvidas mian deĵoron laŭ aparta "stilo": mi ege sopiras resti simpla laboristo en nia federacia teamo, konsciante tamen ke mi eble povos plenumi administraciajn taskojn -mi diru protokolajn- ligatajn al tiu ofico.

Mi ja scias, ke ideoj svarmas en multaj kapoj samideanaj; mi bonvolos helpi konkretigi kelkajn. La vivo aktuala fariĝas terure temporaba, laciga... nia amiko Colnot frontis ja al tiu nerefutebla konstato. Por ke ni ĉiuj povu de tempo al tempo eluzi "stulte" kelkajn horojn pomonate laŭ niaj propraj emoj, estas necese, ke nia poresperanta laboro efektiviĝu laŭ racia plano celante efikan kaj rapidan rezulton: ni do dispartigu nian komunan aktivecon laŭ niaj eblecoj. Laŭtemperamente ni estas malsimilaj (feliĉe!)... Ni elektu la terenon, sur kiu ni preskaŭ certas firme moviĝi kaj sukcesi. Instruado de la lingvo, organizaj problemoj, redaktado, tajpado, propagando, personaj kontaktoj, libroservo, rebatservo, ktp... mi pensas, ke ĉiu el ni povas kunlabori al la komuna celo.

Nia sekretario Edmond LUDWIG jam sendis proponojn... Imitu lin! Ne forgesu, ke mi ŝance (?) estas ankaŭ redaktoro de LA INFORMILO, mia leterkesto estas eksterordinare volumena (la leterportisto miris antaŭ tiaspeca "konstruaĵo": "...Ĉu vi ne timas, ke la abeloj elektos domon ene?...") li demandis al mi!) Do plenigu ĝin!

Lasta atentigo: nia Federacio estas membro de UFE. En UFE blovas nova, freŝa, dinamika vento. Sen UFE nenia decido -ŝtatskale- iam okazos koncerne oficialan agnoskon de Esperanto. Cerbumu ankaŭ kiamaniere helpi efike UFE.

Bonan kaj ripozigan(!) feritempon!

P. DENIS

Ĝis nun el 77 komunikoj senditaj al la regiona gazetararo, ni povis kontroli la aperon de 45 tekstoj. Ĝis fino de majo 210 personoj petis informojn, 58 aliĝis al la kurso kaj 3 el ili atingis la kursofinon.

PERKORESPONDA KURSO ★

La cassette d'accompagnement pour le "Nouveau Cours Rationnel" est enfin à votre disposition (30F à notre libro-servo dont nous parlons par ailleurs). Nous avons pu contrôler la parution de 45 communiqués sur les 77 envoyés à la presse régionale depuis octobre dernier. Jusqu'à fin mai 210 personnes se sont renseignées sur l'espéranto et sur notre cours, 58 d'entre elles y ont adhéré et 3 atteignent déjà la fin de leur étude élémentaire.

Nous sommes très reconnaissants à la presse régionale qui a bien voulu insérer nos communiqués. La palme revient sans doute à l'hebdomadaire "LES AFFICHES DE HAUTE-SAÔNE" (Lure) qui a inséré 7 communiqués, certains plusieurs fois. Nous lui en sommes très reconnaissants ... ainsi qu'à l'hebdomadaire "LES AFFICHES-MONITEUR d'ALSACE ET DE LORRAINE" (Strasbourg) qui a l'amabilité de nous adresser un exemplaire de chaque n° contenant l'un de nos communiqués. Le quotidien L'EST REPUBLICAIN (Nancy) a inséré 6 communiqués (malheureusement, malgré nos demandes répétées, souvent à Nancy seulement ou en Haute-Marne (?) alors que notre cours est destiné à toute la région de l'Est. Le quotidien DERNIERES NOUVELLES D'ALSACE (Strasbourg) a inséré 6 communiqués, LE REPUBLICAIN LORRAIN (Metz) 5, L'ALSACE (Mulhouse) 5, LA LIBERTE DE L'EST (Epinal) et L'UNION (Reims) chacun 3 communiqués, LE NOUVEL ALSACIEN (Strasbourg) et LA HAUTE-MARNE LIBEREE (Chaumont) chacun 2 communiqués.

Merci encore à tous ces journaux qui ont aidé au bon fonctionnement de notre cours. Nous espérons que pour la prochaine année scolaire tous nos communiqués pourront paraître.

Nous demandons à tous nos collaborateurs et élèves de bien vouloir découper les communiqués concernant l'espéranto paraissant dans leurs journaux ou magazines et de nous les adresser avec toutes références utiles. Merci à tous!

Parmi les élèves de cette année vient de terminer le cours Mlle Marie-Ange FOISSEY (Nancy) dirigée par M. ETIENNE (Malzéville). Vont bientôt terminer: M. Edgar DIMAS-MOLINAS (54200 Toul) dirigé par M. GREINER (Ecrouves), M. Roland BEUVARD (08260 Maubert-Fontaine) dirigé par M. Kraemer (Guebwiller). A la liste des élèves de l'an dernier ajoutons Mlle Régine Bianchi (67150 Getsheim) dirigée par M. Meier (67270 Wickersheim)

Félicitations à tous!

J.P. COLNOT

Voici la liste des collaborateurs du cours pour l'année scolaire qui se termine (par ordre d'ancienneté)

M. P. DENIS	55000 BAR-le-DUC	Mlle A. JACQUOT	88000 EPINAL
M. A. GROSSMANN	68390 BALDERSHEIM	M. F. ZIPFEL	67000 STRASBOURG
M. P. ETIENNE	54220 MALZEVILLE	Mme H. LERDUNG	68120 PFASTATT
M. R. DEGRELLE	54042 NANCY	M. J. LINDAU	57100 THIONVILLE
M. A. LIENHARDT	68100 MULHOUSE	M. J. KRAEMER	68500 GUEBWILLER
M. G. GREINER	54200 TOUL	M. M. REMY	70300 LUXEUIL
M. M. GODART	88100 SAINT-DIE	M. Cl. MEIER	67270 WICKERSHEIM
M. E. LUDWIG	68140 STOSSWIHR	M. J.L. VANOLA	55000 BAR-le-DUC
M. Y. GUEGUENIAT	67220 St-PIERRE DES BOIS	M. R. GUILLAUME	54550 PONT-St-VINCENT
M. B. VIVIER	54240 JOEUF	M. M. CROCHET	51200 EPERNAY
Mlle F. ROUAULT	68000 COLMAR		

... et bien entendu votre serviteur J.P. COLNOT 54520 LAXOU.

* NEPRE HAVIGU AL VI KAJ AL VIAJ GEKRESPONDANTOJ BELAJN ETIKEDFOLIOJN

eldonitajn de ESPERANTO - PTT (kiu jam iniciatis la T-trikotojn pri la U.K.)

Temas pri memglueblaj etikedoj orumitaj, tre belaspektaj kun diversaj sloganoj diversokaze uzeblaj...

12 folioj: 18F 30 folioj: 40F 100 folioj: 120F

Simpla mendo dorse de FCK

Adreso: ESPERANTO -PTT BP 126 F 05004 GAF CEDEX

FCK: I P T E A LYON 6052 52 F

nia vivo en

NANCY

La kursoj parolaj nun finiĝis. Ni gratulas S-ron SCHEFFER kaj F-inon MARCHAL, kiuj sukcesis respektive gvidi 3 kaj 1 lernanto(j)n ĝis la fino de la kurso. Ankaŭ en liceo Georges De La Tour finiĝis la kurso, verdire nur unu lernantino kuraĝis ellerni E-on, verŝajne ĉar la ritmo de la kurso estis tro rapida.

Ni organizis la 20an de majo ekzamenon por ĉiuj gelernantoj. Nur unu lernantino kuraĝis veni (kaj brile sukcesis): Fraŭlino Nicole GIRONNET. Gratulojn al ŝi!

PERFEKTIGAJ KURSOJ

Duagrada kaj triagrada kursoj okazis alterne preskaŭ ĉiunonate 1- aŭ 2-foje. Ĝenerale nur unu lernant(in)o, ne ĉiam la sama, ĉeestis ĉiujfoje inter 4-5 interesatoj. Ni esperu ke venontjare iom pli da personoj interesiĝos, kaj ke ni sukcesos trovi datojn, kiam ĉiuj povos ĉeesti.

RADIO-ELSENDO

Intervjuo pri Esperanto okazis en NANCY fare de "Radio-Nord-Est" (France-Inter-Nancy). la 26an de marto 1980. S-ino MAS-GIORGETTI, komitatanino de nia Federacio, kaj profesorino-asistantino en la Scienca Fakultato de Nancy respondis dum preskaŭ duonhora al la plej diversaj demandoj pri E°. Krome, FIL (France-Inter-Lorraine) disaŭdigis komunikojn pri nia perkoresponda kurso.

(Ni disponas pri registraĵo de tiu intervjuo, je la dispono de personoj dezirantaj aŭskulti ĝin).

TURISMA PROSPEKTO

La unua eldono de 5000 ekzempleroj de la turisma prospekto pri NANCY elĉerpiĝis en malpli ol unu jaro. Nova eldono de 5000 ekz. jam aperis, laŭ la sama modelo. Ni sciigas, ke la prospekto estas senpage ricevebla skribante al:

TURISMA OFICEJO, 14 place Stanislas, F 540000 NANCY

(Franclingvanoj prefere skribu franclingve! Vi povas mendi plurajn ekzemplerojn por sendi al viaj gekorespondantoj!)

Esperanto-Gazetoj bonvolu represi tiun informon.

PROSPECTUS EN ESPERANTO (10 pages...) Vous pouvez le recevoir gratuitement en écrivant à l'adresse ci-dessus.



korespondo-servo

Sajnas, ke kelkaj samideanoj ne scias al kiu sin turni por ricevi adresojn de korespondemuloj. Ni memorigas, ke la KORESPONDA SERVO DE U.E.A. (UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO), 12, rue des Jacobins, 63000 CLERMONT-FERRAND, estas je la dispono de ĉiuj por havigi la plej taŭgajn adresojn de korespondemuloj.

Skribante al tiu servo internacia, nepre indiku viajn nomon, antaŭnomon, kompletan adreson, aĝon, profesion, sekson, edz(in)iĝecon aŭ ne, la nombron de korespondantoj dezirataj, la landojn (konsilinde plurajn laŭ ordo de prefero), kaj la ŝatatajn temojn kaj "hobiojn".

Aldonu poŝtmarkon (aŭ internacian kuponon haveblan ĉe via poŝtoŭficejo) por ĈIU petita adreso. Ne forgesu informi la servon, post iom da tempo, pri la sukceso aŭ ne de via korespondado.

notre service de librairie pour ceux qui démarrent...

Adresse: DEGRELLE Roger, 11 Cours Léopold, 54042 NANCY CEDEX

VORTAROJ DICTIONNAIRES

<i>Lexique Fondamental Esperanto-Français</i>	6,00 F
<i>Dictionnaire Pratique Esperanto-Français et Français-Esperanto</i>	45,00 F
<i>Dictionnaire Français-Esperanto (auteurs: Léger/Albaut)</i>	40,00 F
<i>Grand Dictionnaire Esperanto-Français (Waringhien)</i>	60,00 F
<i>PLENA VORTARO (tout esperanto)</i>	45,00 F
<i>PLENA ILUSTRITA VORTARO (tout esperanto) Dictionnaire COMPLET!</i>	195,00 F
<i>Praktika Bild-vortaro (diction. pratique par l'image)</i>	30,00 F
<i>... nouveauté: KIEL DIRI? COMMENT DIRE? un recueil original de milliers d'expressions gravitant autour d'un seul mot... La 1ère édition a été épuisée en quelques semaines.</i>	12,00 F

LERNOLIBROJ LIVRES D'ETUDES

<i>Esperanta Legolibro</i>	10,00 F
<i>Junulkurso</i>	20,00 F
<i>Suplemento al la Junulkurso</i>	4,00 F
<i>Nouveau Cours Rationnel</i>	32,00 F
<i>... nouveauté: cassette enregistrée professionnelle pour ce cours</i>	30,00 F
<i>Por la praktikantoj</i>	20,00 F
<i>Gaja leganto</i>	7,00 F
<i>Esperanto por infanoj</i>	8,00 F
<i>Paŝoj al plena posedo</i>	23,00 F

DISKOJ DISQUES

<i>Tra la mondo (du chanteur suisse Olivier Tzaut)</i>	55,00 F
<i>Al vi de mi (Alberta Casey)</i>	55,00 F

FACILAJ LEGAĴOJ LECTURES FACILES

<i>Asteriks la Gaŭlo</i>	25,00 F
--------------------------	---------

ALDONO AL NIA KATALOGO

<i>1887 kaj la sekvo (esperantologiaj eseoj IV)</i>	<i>Waringhien</i>	70,00 F
<i>Vivendo (poemoj)</i>	<i>Gabrielli</i>	32,00 F
<i>Nuanoj</i>	<i>Sczurek - Gabrielli</i>	26,00 F

... tous les prix indiqués sont susceptibles (hélas!) d'augmenter!

MODE D'EMPLOI

- 1/ Vous commandez votre (ou vos) livre(s)
- 2/ Vous attendez votre livraison A LAQUELLE EST TOUJOURS JOINTE VOTRE FACTURE
- 3/ Vous réglez cette facture à

DEGRELLE ROGER CCP 2555 38 L NANCY

- 4/ Vous commandez à nouveau.....

... et bonne lecture... kaj plezurigan legadon!

Solvoj de la lastaj enigmoj. LA INFORMILO n° 29

- 1/ KRUCVORTENIGMO: karnevalo dua oportuna kimo relo aĉeto bo brodi lorlo er ot saono
lul buo nukso oro urbo vato iĝi korpo paruo ni ega aro ĝemelo
dubleo olivo otido nea mamu jonkvilo obol
- 2/ SILABENIGMO: "Dum la manĝado venas apetito"

Dum via feritempo... aŭskultu elsendojn en esperanto el la tuta mondo!

Ne forgesu skribi viajn sugestojn al la koncernataj radio-stacioj!

Priatentu: pro la "somer-temp-sistemo" vi aldonu 2 horojn al la proponita horaro.



Esperanto en radio

Ĉiujn informojn pri radio bv. sendi al s-ro G. Larglantier (redaktoro de ĉi tiu rubriko), 29, Bd. Murat, F-75016 Paris, Francio. En la tabelo, la horoj de la disendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Pri aliaj horzonoj v. en la Jarlibro 1979, p. 68. Mallongigoj: I = informoj, P = parolado, K = kurso.

ĈIUTAGE

05.00-05.30 Varsovio, 200m (1503 kHz), 75.84m (3955 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz), 41.27m (7270 kHz). I.P. Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00950 Warszawa, Pollando.
11.00-11.30 Pekino, 41.00m (7315 kHz), 30.44m (9860kHz).I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Popola Respubliko Ĉinio.
13.00-13.30 Pekino, 25.67m(11685 kHz), 19.81m(15145kHz). I.
15.30-16.00 Varsovio, 48,90m (6135 kHz), 31,45m (9540 kHz). I.P.
20.00-20.30 Pekino, 43.73m(6860 kHz), 31.98m(9380kHz).I.
21.30-22.00 Varsovio, 200m (1503 kHz), 75.84m (3955 kHz), 50.04m (5995kHz), 49.22m(6095 kHz), 41.18m (7285 kHz). I.P.

DIMANĈE

05.45-05.55 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 19.66m (15260 kHz), 13.90m (21575 kHz). I.P. ORF, Esperanto, A-1136 Wien, Aŭstrio. Ripeto de la antaŭa sabata programo.
17.20-17.30 Lisbono, 19.56m (15340 kHz), 16.78m (17880 kHz). I.P. Radio Difusão Portuguesa, Esperanto, rua do Quelhas, P-1200 Lisboa 1, Portugalio.
18.20-18.30 Lisbono, 49.79m. (6025 kHz), 30.80m (9740 kHz). Kiel je 17.20.
20.00-20.20 Romo, 41.24m (7275 kHz), 41.15m (7290 kHz), 31.33m (9575 kHz). P. Radio Roma, Esperanto-Fako, Casella Postale 320, I-00100 Roma, Italio.
20.05-20.15 Vatikano, 196m (1530 kHz), 48.47m (6190 kHz), 41.38m (7250kHz), 31.17m (9625 kHz), 31.10m (9645 kHz), 25.64. (11700 kHz), 19.84m (15120kHz). I.P. Radiovaticana, Esperanto-fako, Piazza Pia 3, I-00193 Roma, Italio.
20.50-21.00; 21.20-21.30; 21.50-22.00; 22.20-22.30 Lisbono, kiel je 17.20.
23.00-23.15 Rio de Janeiro, 214m (1400kHz). P. Brazila Spiritisma Fe-

deracio, av. Passos 30, Rio de Janeiro, Brazilo.

LUNDE

00.00-01.00 Sorocaba, 278m (1080 kHz). I.K. Rádio Clube de Sorocaba, Esperanto-redakcio, rua da Penha 455, BR-18100 Sorocaba (SP), Braz.
01.20-01.30 Lisbono, 31.14m (9635 kHz), 25.34m (11840kHz).
02.50-03.00 Lisbono, 25.26m (11875 kHz).
03.20-03.30 kaj 05.20-05.30 Lisbono, 49.79m (6025kHz), 25.14m (11935 kHz), kiel dimanĉe.
18.00-18.10 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66 (6165 kHz), 31.46m (9535kHz). P. Svisa Radio Internacia, Esperanto-Fako, CH-3000 Bern 15. Svislando.
22.00-22.10 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66 (6165kHz), 31.46m (9535 kHz), 19.83m (15125 kHz), 16.89m (17760 kHz), 16.83m (17830 kHz), 13.90m (21585 kHz).P.

MARDE

22.45-23.00 Zagrebo, 264m (1163 kHz).P. Radio Zagreb, Esperanto-fako, Zagreb, Jugoslavio.

MERKREDE

22.00-22.15 Sabadell, 203m (1475 kHz). I.K. Radio EAJ 20, Sabadell, Hispanio.

JAŬDE

06.15-06.30 Vatikano, 196m(1530 kHz), 48.47m (6190kHz), 41.38m (7250 kHz), 31.17m (9625 kHz), 31,10m (9645 kHz), 25.61m (11715 kHz), 25.55m (11740kHz), 19.84m (15120 kHz), kaj M.F. 93.0 MHz, 96.5 MHz. I.P.
17.50-17.55 Vieno, 89.8 MHz (mod. frekv.). I. ORF, Esperanto, Postfach 700, A-1041 Wien, Aŭstrio.
18.00-18.10 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.
22.00-22.10 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

Viaj leteroj al la redakcioj de la Esperantaj radio-elsendoj estas la sola signo pri ilia populareco.

VENDREDE

20.30-20.45 Valencio, 358m (836 kHz).P. La Voz de Valencia, av. del Cid 154, Valencia 14, Hispanio.

SABATE

16.45-16.55 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 30.71m(9770kHz), 19.28m (15560kHz). I.P.
18.00-18.10 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.
22.00-22.10 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

ĜENERALA AŬDEBLECO

Ne estas eble certigi, ke iu elsendo estas aŭ ne estas kaptebla en difinita lando aŭ mondparto. Tro multe da daŭraj aŭ nedaŭraj cirkonstancoj influas la propagadon de ondoj: atmosfera stato, sezono, parto de la tago, geografia ĉirkaŭaĵo de la aŭskultanto, tipo de la ricevilo kaj de la eventuala anteno ktp. Jen tamen kelkaj ĝeneralaj indikoj.

a) Direktitaj ondoj. Berno: 15125, 17760, 17830 kaj 21585 kHz al Afriko; 21585 kHz al Suda Ameriko 3985, 6165 kaj 9535 kHz al Eŭropo. Lisbono: 15340 kaj 17880 kHz al Afriko; 9635 kaj 11840 kHz al Brazilo; 6025 kaj 11935 kHz al Norda Ameriko; 11875 kHz al Suda Ameriko; 6025 kaj 9740 kHz al Eŭropo. Pekino: 7315 kaj 9860kHz al Japanio kaj Koreo; 11685 kaj 15145kHz al Sudorienta Azio; 6860 kaj 9380 kHz al Eŭropo. Vatikano: 9625, 11700 kaj 15120 kHz al Afriko; 6190, 9645, 11740 kHz al Ameriko; 6190, 7250, 9625, 9645 kaj 11715 al Eŭropo. Vieno: 6155, 9770 kHz al Eŭropo; 15260kHz al Nordorienta Ameriko; 15560kHz al Proksima Oriento; 21575kHz al Aŭstralio kaj Azio.
b) Nedirektitaj ondoj kapteblaj longdistance: Romo, Varsovio, Vatikano (1530 kHz).

c) Nur loka aŭskultebleco por Rio de Janeiro, Sabadell, Sorocaba, Valencio kaj ĉiuj disaŭdigoj per modula frekvenco (M.F.).



dистра angulo



— KRUC-VORT-ENIGMO *

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1												
2												
3												
4												
5												
6												
7												
8												
9												
10												
11												
12												

HORIZONTALE

- 1 Sonorilaro nun plejofte elektra - superega
- 2 ornama bulba planto - maceri por prepari ekz. kanabon.
- 3 konfuza voĉbruo - ĝi garantias la aŭtentikecon.
- 4 laŭ ĝi estas la sama premo - granda rabobesto.
- 5 oni povas tie ripozi kaj sensoi fiĝi.- regresigi.
- 6 fabela estaĵo - pafilego aŭ muzikaĵo - popola ĉina religio.
- 7 ruza rimedo por trompi - suĉilo.
- 8 akvoplanto, kies floro estas sankta signo - ne ekzistas sen fajro - en ia loko.
- 9 oni eltiras ĝin el animala aŭ vegetaĵa origino. moviĝos, paŝante aŭ kurante, ktp - abstraktaĵo rigardata kiel reala ekzistaĵo.
- 10 duonglacia trin-
- kaĵo - por anstataŭi venton aŭ motoron.
- 11 ekskluziva memamo - dio de la ventoj.
- 12 vivmaniero - pli solida ol ledo - taĉmento da soldatoj.

VERTIKALE 1 Oni uzas en kuirarto ĝiajn sekigitajn florburĝonojn - prapatro de la semida raso. 2 distriga - fakulo pri farado de vinoj. 3 murrompilo - oni rikoltas ĝin sur la marbordo. 4 ina vestaĵo - relativa pronomo - japana zono. 5 Eŭropa mono - ĝi turniĝas ĉirkaŭ akso (rad) - ripozo (rad). 6 franca regiono - kiu formas kun alia linio kvar egalajn angulojn. 7 ĝiaj akvoj enfluas Sejnon - bruligebla substanco - pirenea lago. 8 daŭro de tera rotacio - speco de likeno. 9 infanmanĝanta giganto.- eperlano. 10 malso vaĝigi - unuo de volumeno (2,83 m). 11 oni - nombrensemblo, kiu prezentas apartajn ecojn. 12 radioaktiva elemento - du vokaloj - ankoraŭ la sama flankrivero de Sejno.

poemoj

FORĴETU LA FLAGOJN!

Ni volis
amori
sed ĉiam la flago
ĝenis

Mi volis
kisi vian buŝon
sed la flago
kovris
vian vizagon

Mi volis
ke miaj manoj
por karesi
vin
estu mil manoj
sed ili kaptigis
en la ŝtofo
de via
flago

Dignon kaj humanecon
ĝi kaŝas
kaj
vian
belecon

Esperantistoj ...
forĵetu la flagojn!

Germaine HOFFMANN
Luxembourg



Marguerite HAEUSSER

OMAGE

AL MIA AMATA HEJMURBO...

Ho Wissemburgo, mia hejmurbo!
Vi restas kiel nesto ĉe l'arbo
Ĉirkaŭata de bela, verda zono,
Trafluata de pura, klara rivero...

Inter ĝiaj florumitaj kajoj
Laŭtero babilas kun la birdoj,
Turoj de la katedralo kiel pintoj
Streĉas sin ĝis l'altaj, blankaj nuboj.

Kiel ĉarmas viaj lignaj domoj
Ĉe elegantaj kaj larĝaj stratoj!
Kiel lumas la vogejaz, rozaj ŝtonoj
De l'urbdomo, de malnovaj preĝejoj.

Tra Alzaco, tra l'tuta mondo
Ne estas malgranda, bela urbo,
Kiu same plaĉas al mia koreto...
Vivu feliĉe, ho mia Wissemburgo!